

A.Strugackij
B.Strugackij

Komforta planedo

Hajfo
2014

Tradukis A.Kerbel

Komforta planedo

Arkadij Strugackij (1925–1991)

Boris Strugackij (1933–2012)

Rju staris nuda ĝis la zono en suka verda herbo, kaj rigardis kiel malleviĝas la helikoptero. Pro vento, kiun kaŭzis la rotoro, sur la herbo iris larĝaj ondoj, arĝentaj kaj malhel-verdaj. Al Rju ŝajnis ke la helikoptero descendas tro malrapide, tial li malpacience paŝadis sur la loko. Estis tre varme kaj sufoke. La eta blanka suno staris alte, de la herbo levigis humida varmego. La rotoro ekjelpis pli laŭte, la helikoptero turniĝis al Rju per sia flanko, falis tuj je ĉirkaŭ metro kaj duono, kaj dronis en la herbo sur pinto de la altaĵeto. Rju ekkuris supren laŭ la deklivo.

La motoro silentiĝis, la rotoro ektorniĝis malpli rapide, kaj haltis. El kajuto de la helikoptero ekis elgrimpadi homoj. Unua elgrimpis altstatura homo en jako kun kuspitaj manumoj. Li estis sen kasko, liaj senkoloriĝintaj haroj hirtiĝis super la longa bruna vizaĝo. Rju rekonis lin: tio estis Genadij Komov, grupestro de Spurserĉistoj.

– Saluton, mastro! – gaje diris Komov, etendante la manon. – *Konniti-va* !

– *Konniti-va*, Spurserĉistoj, – diris Rju. – Bonvenon sur Leonida.

Ankaŭ li etendis la manon, sed ili devis iri renkonten ankoraŭ dekon da paŝoj.

– Mi tre, tre ĝojas vidi vin! – diris Rju **sma-**

jlante¹ plenbuŝe.

– Ĉu vi enuiĝis?

– Tre, tre enuiĝis. Ja sola sur la tuta planedo.

Post dorso de Komov iu diris "oj!", kaj io brue falis en la herbon.

– Tio estas Boris Fokin, – diris Komov ne turniĝante. – Memfalanta arkeologo.

– Ĉar ĝis tiom teruras la herbo! – diris Boris Fokin, leviĝante. Ĉe li estis rufaj lipharoj, nazo, superŝutita per lentugoj, kaj blanka ŝaŭmoplasta kasko, surkapigita oblikve. Li viŝis je la pantalono la manplatojn, malpurigitajn per la verdaĵo, kaj prezentis sin: – Fokin, spurserĉisto-arkeologo.

– Bonvenon, Fokin, – diris Rju.

– Kaj tio estas Tanja Palej, inĝeniero-arkeologo.

Rju rektiĝis, kaj ĝentile klinis la kapon. La inĝeniero-arkeologo havis grizajn senpripense kuraĝajn okulojn, kaj blindigajn dentojn. Mano ĉe la inĝeniero-arkeologo estis forta kaj raspa. Kombineo sur la inĝeniero-arkeologo pendis tre elegante.

– Mia nomo estas Tanja, – diris la inĝeniero-arkeologo.

– Rju Vaseda, – diris Rju. Rju estas propra nomo, Vaseda – familia.

– Mboga, – diris Komov. – Biologo kaj ĉasisto.

– Kie? – demandis Rju. – Ha! bonvolu pardoni min. Mil pardonpetojn.

– Ne gravas, sinjoro Vaseda, – diris Mboga, –

2. smajlo: la vorto utilas por indiki ĝoj-esprimon mienan, **senŝonan**, kontraste al rido, kiu estas ĝoj-esprimilo **sona:** smajlo, smajleto, smajlego; rido, rideto, ridego. (Propono).

saluton.

Mboga estis pigmeo el Kongo, kaj super la herbo videblis nur lia nigra kapo, strikte volvita per blanka tuko. Apud la kapo elstaris nigra tubo de la karabeno.

– Tio estas Tora-ĉasisto, – diris Tanja.

Rju devis kliniĝi por premi manon de Tora-ĉasisto. Nun li sciis kio estas Mboga. Tora-ĉasisto, ano de Komitato pri gardo de aliplaneda bestaro. Biologo, malkovrinta monstrajn marsajn "*sora-tobu hiru*" – "flugantajn hirudojn". Rju tre ĝenis pro sia maltrafo.

– Mi vidas ke vi estas senarmita, Rju, – rimarkis Mboga.

– Fakte mi havas pistolon, – diris Rju, – sed ĝi estas tre peza.

– Mi komprenas. – Mboga aprobe kapjesis, kaj ĉirkaŭrigardis. – Tamen ekbruligis ni la stepon, – diris li nelaŭte.

Rju retrorigardis. De la altaĵeto ĝis la horizonto mem tiriĝis ebenaĵo, kovrita per brila suka herbo. Je tri kilometroj de la altaĵeto la herbo brulis, bruligita per reaktoro de la ŝalupo. La ĉielon enrampis densaj buloj da blanka fumo. Post la fumo neklare videblis la ŝalupo: malhela ovo sur tri disigitaj apogiloj. Ĉirkaŭ la ŝalupo nigriĝis vasta forbruligita rondo.

– Tio post nelonge estingiĝos, – diris Rju. – Ĉi tie estas tre humide. Iru ni, mi montros al vi vian mastrumejon.

Li prenis **na**² Komov je la mano, kaj kondukis lin preter la helikoptero al alia flanko de la altaĵeto. Ĉiuj eksekvis ilin. Rju kelkfoje rerigardis, kun smajlo kapklinante al ili. Komov diris ĉagrene:

– Ĉiam malagrablas, se la alteriĝo elvokas aĉaĵojn.

– Post nelonge estingiĝos, – ripetis Rju.

Li aŭdis kiel malantaŭe Fokin zorgas pri la inĝeniero-arkeologo:

– Pli atente, Tanjo, ĉi tie, ŝajne, estas turbulo...

– Vidas mi, – respondis la inĝeniero-arkeologo.
– Rigardu vi sub viajn piedojn.

– Jen la mastrumejo, – diris Rju.

La verdan ebenaĵon traigis vasta trankvila rivero. En **meandro**³ de la rivero brilis gofrita tegmento.

– Tio estas mia labo, – diris Rju.

Dekstre de la labo en la ĉielon leviĝis strioj da ruĝa kaj nigra fumo.

– Tie konstruiĝas remizo, – diris Rju.

Videblis iuj ombroj, kiuj tumultis en la fumo. Por momento aperis ega malgracia maŝino sur raŭpoj: ĉefroboto, kaj tuj io sparkis en la fumo, ekaŭdiĝis tondrobruo, kaj la fumo densiĝis.

– Kaj jen tie staras la urbo, – diris Rju.

2. na: akuzativa prepozicio, propono far G. F. Makkink. Utilas por konservi rekoneblon de propraj nomoj. Komparu: li renkontis: a) Rjuon. b) **na** Rju.

3. meandro: kurbaĵo de rivero, vojo ktp (PIV).

De la centralo ĝis la urbo estis iom pli ol kilometro. Konstruaĵoj de la urbo ŝajnis, de la altaĵeto, grizaj malaltaj brikoj. Dek-seso da grizaj plataj brikoj, starantaj en la verda herbo.

– Jes, – diris Fokin, – la konstruado estas tute nekutima.

Komov silente klinis la kapon. Tiu ĉi urbo tute ne similis aliajn. Ĝis malkovro de Leonido Spurs-erĉistoj, laborantoj de Komisiono pri esploro de agad-spuroj de alia menso en Kosmo, okupiĝis nur pri du urboj. Tio estis malplena urbo sur Marso, kaj malplena urbo sur Vladislavo. La ambaŭ urbojn sendube konstruis sama arkitekto. Tio estis cilindraj konstruaĵoj, per multaj etaĝoj enirantaj la grundon, produktitaj el lumanta organik-silicio, kaj dispoziciitaj cirkle. Sed ĉi tie, sur Leonido, urbo estis tute alia. Du vicoj da grizaj skatoloj el poreca kalka ŝtono.

– Ĉu vi estis tie post Gorbovskij? – demandis Komov.

– Ne, – respondis Rju, – eĉ ne unufoje. Fakte mi ne havis tempon. Ja mi estas ne arkeologo sed atmosfera fizikisto. Krom tio Gorbovskij petis min ne iri tien.

Bu-buĥ! – venis de la konstruejo. Tie dens-nube elŝiriĝis ruĝaj strioj da fumo. Trans ili jam konturiĝis glataj muroj de la remizo. La ĉef-roboto elgrimpis el la fumo en la herbon. Apud ĝi saltadis nigraj **kiber**⁴-konstruantoj, similaj al **mantoj**⁵. Post

4. kiber: kibernetika maŝino.

5. manto: insekto, kiu kaptas sian predon per la antaŭaj membroj (PIV).

tio la kiberroj viciĝis, kaj ekkuris al la rivero.

– Ja kien ili? – scivole demandis Fokin.

– Baniĝi – diris Tanja.

– Ili ebenigas la superŝutaĵon, – klarigis Rju. – La remizo estas preskaŭ preta. Nun la tuta sistemo ŝanĝiĝas. Ili konstruos hangaron kaj akvokondukilon.

– Akvokondukilon! – raviĝis Fokin.

– Tamen pli bone estus malproksimigi la centralon disde la urbo, – diris Komov dube.

– Tio estis ordono de Gorbovskij, – diris Rju. – ne estas bone malproksimiĝi de la centralo.

– Ankaŭ tio veras, – konsentis Komov, – sed ne difektigu viaj kiberroj la urbon...

– Pri kio vi! Ili ne iras tien.

– Ĝis kiom komforta estas la planedo! – diris Mboga.

– Jes! Jes! – ĝoje konfirmis Rju. – Rivero, aero, verdaĵo, kaj neniuj kuloj, neniuj malutilaj insektoj!

– Ege komforta planedo, – ripetis Mboga.

– Ĉu oni povas baniĝi? – demandis Tanja.

Rju alrigardis la riveron. La rivero estis verdeta, malklara, sed tio estis vera rivero kun vera akvo. Leonido estis unua planedo sur kiu okazis aero, taŭga por spirado, kaj vera akvo.

– Baniĝi, laŭ mia opinio, eblas, – diris Rju. – Tamen mi mem ne baniĝis: mankis la tempo.

– Ni baniĝos ĉiutage, – diris Tanja.

– Certe! – kriis Fokin. – Ĉiutage! Tri fojoj tage! Ni faros nenion krom baniĝo!

– Kaj kio estas tie? – demandis Komov, – li montris ĉenon da plataj altaĵetoj ĉe la horizonto.

– Mi ne scias, – respondis Rju. – Tie ankoraŭ estis neniuj. Valkenŝtejn malsaniĝis subite, do Gorbovskij devis forflugi. Antaŭ la forflugo li sukcesis nur elŝarĝi instalaĵon por mi.

Iom da tempo ĉiuj staris silente, kaj rigardis la atajetojn ĉe la horizonto. Poste Komov diris:

– Post tri tagoj mi mem flugos laŭ la rivero.

– Se estas ankoraŭ iuj spuroj, – rimarkis Fokin, – oni devas serĉi ilin ĉe la rivero.

– Verŝajne, – ĝentile konsentis Rju. – Kaj nun iru ni al mi.

Komov retrorigardis la helikopteron.

– Ne gravas, restu ĝi tie, – diris Rju. – hipopotamoj sur la holmojn ne leviĝas.

– Ho! diris Mboga. – Hipopotamoj?

– Ne, simple mi nomas ilin tiel. De malproksime ili similas hipopotamojn, sed proksime mi ilin ne vidis.

Ili komencis malsupreniĝi de la holmo.

– Sur tiu flanko herbo estas tre alta, do mi vidis nur iliajn dorsojn.

Mboga iris apud Rju per mola glitanta paŝmaniero. La herbo kvazaŭ ĉirkaŭfluis lin.

– Krom tio ĉi tie estas birdoj, – daŭrigis Rju. – Ili estas tre grandaj, kaj iam flugas tre malalte. Unu el ili preskaŭ renversis ĉe mi la radaron.

Komov, ne malrapidante la paŝadon, ekrigardis la ĉielon, per la mano ŝirmante sin de la suno.

– Bonokaze, – diris li, – mi devas sendi radiogramon al «Sunfloro». Ĉu eblas uzi vian radiokomunikilon?

– Kiom vi volas, – diris Rju. – Ĉu vi scias, Persi

Dikson volis vundpafi unu el ili. Mi parolas pri bir-
doj. Sed Gorbovskij ne permesis.

– Kial? – demandis Mboga.

– Mi ne scias, – respondis Rju. – Sed li estis
terure kolera, kaj volis eĉ forpreni de ĉiuj la armilo-
jn.

– De ni li forprenis, – diris Fokin. – Tio estis ega
skandalo en Konsilio. Laŭ mi okazis tre malbele:
Gorbovskij simple dispremis nin ĉiujn per sia aŭtoriti-
tato.

– Sed ne na Tora-ĉasisto, – rimarkis Tanja.

– Jes, mi kunprenis la armilon, – diris Mboga. –
Sed mi komprenas na Gorbovskij. Ĉi tie malagrablas
pafi.

– Tamen Gorbovskij estas homo kun strangaĵoj,
– deklaris Fokin.

– Eble, – diris Rju diskrete.

Ili venis al vasta kupolo de la labo kun malalta
ronda pordeto. Super la kupolo diversdirekten
turniĝis tri retaj teleretoj de radaroj.

– Ĉi tie vi povas starigi viajn tendojn, – diris
Rju. – Sed se estas bezonate, mi ordonos al la
kiberoj, kaj ili konstruos por vi ion pli fortikan.

Komov alrigardis la kupolon, bulojn da ruĝa kaj
nigra fumo post la labo, poste retrorigardis grizajn
tegmentojn de la urbo, kaj diris pardonpete:

– Ĉu vi scias, Rju, mi timas ke ni malhelpos al
vi ĉi tie. Pli bone ni instaliĝos en la urbo, ĉu?

– Krom tio ĉi tie brulodoras, – aldonis Tanja, –
kaj mi la kiberojn timas...

Rju ofende levis la ŝultrojn.

– Kiel vi volas. Laŭ mi ĉi tie estas tre bone.

– Translokiĝu al ni, post kiam ni starigos la tendojn, – diris Tanja. – Vi vidos: plaĉos al vi.

– M-m-m... – muĝis Rju. – Verŝajne... Kaj dume, mi petas, eniru al mi.

La arkeologoj, antaŭkliniĝante, direktiĝis al la malalta pordeto. Mboga iris lasta, li eĉ ne devis klini la kapon.

Rju prokrastis sur la sojlo. Li ĉirkaŭrigardis, ekvidis tretitan teron, flaviĝintan ĉifitan herbon, malgajajn stakojn da litoplasto, kaj ekpensis ke ĉi tie vere sentiĝas odoro de fumo.

La urbo konsistis el sola strato, tre larĝa, superkreskita per densa herbo. La strato iris preskaŭ ĝuste laŭ la meridiano, kaj finiĝis proksime al la rivero. Komov decidis starigi la tendaron meze de la urbo. Starigadon de la tendaro oni komencis je la tria post la tagmezo laŭ loka tempo (tagnokto sur Leonido konsistis el dudek sep horoj kun iom da minutoj).

La varmego kvazaŭ plifortiĝis. Vento forestis, super grizaj paralelepipedoj de la konstruaĵoj tremetis varma aero, kaj nur en suda parto de la urbo, pli proksime al la rivero, estis iom pli freŝe. Odoris, laŭ vortoj de Fokin, per fojno, kaj «iom per plantejo de *ĥlorela*».

Komov prenis na Mboga kaj Rju, kiu proponis la helpon, ensidis la helikopteron, kaj forflugis al la ŝalupo por preni instalaĵon kaj provianton, kaj Tanja kaj Fokin ekokupiĝis pri topografiado de la urbo. Instalaĵo ne estis multa, do Komov transportis ĝin per du flugoj. Kiam li alflugis unuan fojon, Fokin, hel-

panta dum la elŝarĝo, multsignife informis ke ĉiuj konstruaĵoj de la urbo estas sufiĉe samaj laŭ la dimensioj.

– Tre interese, – diris ĝentila Rju.

– Tio pruvas, – informis Fokin, – ke ĉiuj konstruaĵoj havas saman destinon. Restis nur evidentigi kiun, – aldonis li post ioma pripenso.

Kiam la helikoptero revenis duan fojon, Komov ekvidis ke Tanja kaj Fokin starigis altan stangon, kaj levis super la urbo neoficialan standardon de Spurserĉistoj: blankan tukon kun simbola sep-edra ŝraŭbingo.

Tre delonge, antaŭ preskaŭ cent jaroj, unu grava interplanedisto, ega kontraŭulo de ideo esplori agad-spurojn de alia menso en Kosmo, deklaris, emociiĝinte, ke estiel senduban pruvon de tiu agado li pretas opinii nur radon sur la akso, desegnon de Pitagor-teoremo, ĉizitan sur roko, kaj sep-edran ŝraŭbingon. Spurserĉistoj akceptis la defion, kaj dekoris sian standardon per bildo de sep-edra ŝraŭbingo.

Komov plezure salutis la standardon. Multe da brulaĵo estas eluzita, multe da **parsekoj**⁶ estas trairitaj de kiam naskiĝis tiu ĉi standardo. Unue oni levis ĝin super rondaj stratoj de malplena urbo sur Marso. Tiam ekzistis ankoraŭ fantasta hipotezo pri tio ke la urbo kaj satelitoj de Marso povas esti fenomenoj naturaj. Nur plej kuraĝaj spurserĉistoj opiniis tiam ke la urbo kaj la satelitoj estas solaj spuroj de mistere malaperinta marsa civilizo. Do oni

6. parseko: interstela distanco, 3.25 lumjaroj (PIV).

devis trairi multe da parsekoj, kaj fos-renversi multe da grundo antaŭ ol nerefutita restis unusola hipotezo: la malplenaj urboj kaj lasitaj satelitoj estas konstruitaj per venintoj el malproksima kaj nekonata planed-sistemo. Sed tiu ĉi urbo sur Leonido...

Komov elĵets el kajuto de la helikoptero lastan pakon, desaltis sur la herbon, kaj energie batfermis la pordeton. Rju venis al li, mallevigante la kuspitaĵn manumojn, kaj diris:

– Kaj nun permesu al mi lasi vin, Genadij. Post dudek minutoj ĉe mi estas sondado.

– Certe, – diris Komov. – Dankon, Rju. Venu al ni vespermanĝi.

Rju rigardis la horloĝon, kaj diris:

– Dankon, Mi ne promesas.

Mboga, staranta meze de la strato, kaj apoginta la karabenon al muro de plej proksima konstruaĵo, blovpufigis la tendon. Li rigardetis forirantan Rju, kaj smajlis al Komov, distirante la grizajn lipojn sur la eta sulka vizaĝo.

– Vere komforta planedo, Genadij, – diris li.– Ĉi tie oni iras sen armiloj, starigas la tendojn senpere sur herbo... Kaj jen tio...

Li kapsignis flankon de Fokin kaj Tanja. Spurs-erĉisto-arkeologo, kaj inĝeniero-arkeologo, fortretinte ĉirkaŭe la herbon, okupiĝis en ombro de konstruaĵo pri la ekspres-labo. Inĝeniero-arkeologo vestis silkan senmanumaĵon kaj mallongan pantalonon. Ŝiaj pezaj ŝuoj paradis sur tegmento de la konstruaĵo, kaj la kombineo kuŝaĉis apude sur la pakoj. Fokin, en sporta pantaloneto, furioze ŝiris

trans la kapo la ĉemizon, malsekan pro la ŝvito.

– Malfeliĉo vi mia, – diris Tanja, – kien vi konektis la akumulatoron?

– Momenton, Tanjo! – neklare respondis Fokin.

– Jes, – diris Komov, – tio ne estas Pandoro.

Li eltiris el pako duan tendon, kaj komencis al-fiksi al ĝi centrifugan pumpilon. «Jes, tio ne estas Pandoro», – pensis li, kaj elmemoris kiel ili, sur Pandoro, rompiĝis tra la krepuskaj ĝangaloj, kaj sur ili estis pezaj skafandroj de plej alta gardo, kaj la manojn pezis malgracia pafpreta desintegrilo. Sub la piedoj plaŭdadis, ĉe ĉiu paŝo diversflanken ĵetiĝis multpieda aĉaro, kaj super la kapo, tra miksaĵo de gluecaj branĉoj, morne lumigis du proksimaj sangaj sunoj. Kaj ĉu nur sur Pandoro! Sur ĉiuj planedoj kun atmosfero Spurserĉistoj kaj Descendistoj moviĝis kun ekstrema atentemo, pelis antaŭ si kolonojn da robotoj-esploristoj, memmovantajn kiberajn bio-labojn, toksoanalizilojn, kondensitajn nubojn da universalaj virusofoboj. Tuj post elŝipiĝo ŝipestro estis devigata forbruli per termito zonon de sendanĝero. Kaj plej altgrada krimo estis reveno sur la ŝipon sen anticipa zorgema desinfekto kaj desinsekto. Nevideblaj monstroj, pli teruraj ol pesto kaj lepro, embuskis nesingardulojn. Tio estis nur antaŭ dek jaroj.

Samo povus esti ankaŭ nun, sur la komforta Leonido. Ankaŭ ĉi tie estas mikrofaŭno, kaj tre abunda. Sed antaŭ dek jaroj eta doktoro Mboga trovis sur terura Pandoro na "bakterio de vivo", kaj profesoro Karpenko, sur Tero, malkovris bioblokadon. Unu injekto tagnokte. Eblas eĉ unu

semajne. Komov viŝis la ŝvitan vizaĝon, kaj kome-
cis malbutonumi la jakon.

Kiam la suno kliniĝis al okcidento, kaj ĉielo ori-
ente el blanketa ekestis malhel-lilaka, ili sidiĝis
vespermanĝi. La tendaro estis preta. Sur la strato,
transverse, staris tri tendoj; pakoj kaj kestoj kun la
instalaĵo estis akurate metitaj laŭ muro de unu el la
konstruaĵoj. Fokin, suspirante, jam preparis la ves-
permanĝon. Ĉiuj estis malsataj, do decidis ne aten-
di na Rju. El la tendaro videblis ke Rju sidas sur
tegmento de sia labo, kaj okupiĝas pri la antenoj.

– Ne gravas, ni lasos al li, – promesis Tanja.

– Kio ja, – diris Fokin, manĝante la kuiritan
bovidaĵon, – ekmalsatos kaj venos li.

– Maloportune vi starigis la helikopteron,
Genadij, – rimarkis Tanja. – Tutan vidaĵon sur la
riveron ĝi baris.

Ĉiuj alrigardis la helikopteron. Vidaĵo sur la
riveron vere forestis.

– Bona vidaĵo sur la riveron malfermiĝas de la
tegmento, – senpasiĉe diris Komov.

– Sed vere, – diris Fokin, sidanta dorse al la
rivero. – Absolute forestas io por rigardadi plezure.

– Kial forestas, – diris Komov same senpasiĉe.
– Kaj la bovidaĵo?

Li kuŝiĝis sur la dorson, kaj komencis rigardi la
ĉielon.

– Jen pri kio mi pensas, – komencis Fokin, puri-
gante la lipharojn per la buŝtuko. – Kiel ni en-
rompiĝos en tiujn ĉi ĉerkojn?

– Li pikis la fingron en plej proksiman konstru-
aĵon. – Ĉu fosos ni, aŭ tranĉos la muron?

– Ĝuste tio ne estas problemo, – respondis Komov maldiligente. – Interese estas kiel trafis tien la mastroj, – jen la problemo. Ĉu ankaŭ ili tranĉis la murojn?

Fokin pripense alrigardis na Komov, kaj demandis:

– Sed kion, fakte, vi scias pri tiuj ĉi mastroj? Eble ili tute ne bezonis trafi tien.

– Jen, – diris Tanja. – Nova arkitektura principo. La homo sidiĝas sur la herbeton, konstruas ĉirkaŭ si murojn kaj la plafonon, kaj... kaj...

– ...kaj deiras, – finis Mboga.

– Sed eble tio vere estas tombejoj? – diris Fokin defie.

Iom da tempo ĉiuj pripensis tiun ĉi supozon.

– Tanja, kio pri la analizoj? – demandis Komov.

– Kalko, – respondis Tanja. – kalci-oksido. Certe kun multaj almiksaĵoj. Sed, entute, ĉu vi scias kion tio ĉi similas? Koralan rifon. Krom tio ŝajnas ke la tuta konstruaĵo estas produktita el unu peco...

– Monolito de natura deveno.

– Natura. Jen kiel! – eksklamaciis Fokin. – Karaktera periodeco – post malkovro de novaj spuroj tuj aperas homoj kiuj deklaras ke tio estas kreaĵo de naturo...

– Natura supozo, – diris Komov.

– Jam morgaŭ ni instalos la intravidilon, kaj enrigardos, – promesis Tanja. – Gravas ke tiu ĉi kalko havas nenion komunan kun *sukcenito*, el kiu estas konstruita la marsa urbo. Kaj urbo sur Vladislavo.

– Do ankoraŭ iu vagas sur planedoj, – diris Komov. – Estus bone se ĉi-foje ili lasu al ni ion pli

konkretan.

– Bibliotekon trovi! – elĝemis Fokin. – Maŝinojn iujn!

Ili eksilentis. Mboga elprenis sian kurtan pipeton, kaj komencis ŝtopigi ĝin. Li sidis kaŭre, kaj penseme rigardis super la tendoj en la helan ĉielon. Lia eta vizaĝo sub la blanka tuko esprimis plenan kvieton kaj kontentiĝon.

– Estas tiel trankvile, – diris Tanja.

– Bum! Baĥ! Tararaĥ! – venis de la centralo.

– Diable! – murmuris Fokin. – Sed tio por kio?

Mboga eligis ringeton de fumo, kaj diris mal-laŭte:

– Mi komprenas vin, Boris. Mi mem unue en la vivo ne sentas ĝojon, aŭskultante kiel niaj maŝinoj laboras sur malpropra planedo.

– Iel ne malpropra ĝi estas, jen la problemo, – diris Tanja.

Granda nigra skarabo alflugis neniu scias de kie, faris, peze zumante, rondon super la Spurs-erĉistoj, kaj forflugis. Fokin sibletis mallaŭte, enŝovinte la nazon en la fleksitan kubuton. Tanja leviĝis, kaj foriris en la tendon. Ankaŭ Komov lev- iĝis, kaj delice streĉiĝis. Estis tiel trankvile kaj bone ĉirkaŭe, ke li tute konsterniĝis kiam Mboga, kvazaŭ ĵetita per risorto, saltleviĝis subite, kaj ŝtoniĝis, turniginte la vizaĝon al la rivero.

Iu giganta nigra bestkorpo ŝoviĝis sur la tendon. La helikoptero parte ŝirmis ĝin, sed videblis kiel ĝi ŝanceliĝas irante, kaj kiel la vespera suno lumigas ĝiajn malsekajn grasbrilajn flankojn, dis- blovitajn kvazaŭ ventrego dehipopotamo.

La korpo moviĝis sufiĉe rapide, disigante la herbon, kaj Komov kun teruro ekvidis ke la helikoptero ekbalanciĝis, kaj komencis malrapide fali flanken. Inter muro de la konstruaĵo, kaj fundo de la helikoptero traŝoviĝis malalta masiva frunto kun du egaj tuberoj. Komov ekvidis du konkavajn stultajn okulojn, direktitajn, kiel ŝajnis al li, rekte sur lin.

– Singarde! – elkriis li.

La helikoptero falis, apoginte sin je la herbo per padeloj de la rotoro. La monstro daŭrigis sian moviĝon al la tendaro. Ĝi estis ne malpli ol tri metroj alta, ĝiaj konveksaj flankoj takte disbloviĝis, kaj aŭdiĝis ritma brua spirado.

Post dorso de Komov Mboga klakis per kulaso de la karabeno. Tiam Komov rekonsciiĝis, kaj ekis retroiri al la tendoj. Preter, devancante lin, tre rapide kaj kvarpiede trakuris Fokin. La monstro estis jam je dudek paŝoj.

– Ĉu vi sukcesos malmunti la tendaron? – rapide demandis Mboga.

– Ne, – respondis Komov.

– Mi pafos!

– Atendu, – diris Komov. Li paŝis antaŭen, svingis la manon, kaj kriis: Halt!

Por unu momento tiu ĉi monto da viva viando haltetis. La tuberizita frunto subite leviĝis, kaj frape malfermiĝis buŝego vasta, kiel kajuto de helikoptero, ŝtopita per verda herba maĉaĵo.

– Genadij! – kriis Tanja. – Tuj malantaŭen!

La monstro eligis longan raŭkan sonon, kaj ekmoviĝis antaŭen eĉ pli rapide.

– Halt! – kriis Komov denove, sed ĉi-foje tute

sen entuziasmo. – Ŝajnas ke tio estas herbmanĝulo,
– informis li.

Mboga staris kun karabeno ĉe la ŝultro, kaj Tanja ŝtopis jam la orelojn. Apud Tanja, kun pako sur la dorso, staris Fokin. Liaj lipharoj estis taŭzitaĵoj.

– Ĉu oni pafos hodiaŭ aŭ ne? – ekkriaĉis Fokin per premita voĉo. – Ĉu mi forportu la intravidilon aŭ...

Du-dut! Duonaŭtomata ĉasista karabeno de Mboga havis kalibron 16.3 milimetroj, kaj batforto de la kuglo, je dek paŝoj, egalas al ok tunoj. La bato trafis mezon mem de la frunto, inter la du tuberoj. La monstro frape eksidis sur la postaĵon. Du-dut! La dua bato renversis la monstron sur la dorson. La kurtaj dikaj piedoj konvulsie ekŝiriĝis en la aero. «Ĥ-Ĥa-a» – ekaŭdiĝis el la densa herbo. Elbloviĝis, ŝrumpiĝis la nigra ventregoj, kaj ĉio kvietiĝis. Mboga mallevis la karabenojn.

– Iru ni rigardi – diris li.

Laŭ dimensioj la monstro ne cedis al adolta afrika elefanto, sed plej multe ĝi memorigis gigantan hipopotamon.

– La sango estas ruĝa, – diris Fokin. – Sed kio estas tio?

La monstro kuŝis sur la flanko, kaj sur ĝia ventregoj liniigis tri vicoj da molaj elkreskaĵoj, grandaj kiel pugno. El la elkreskaĵoj gutis brila densa likvaĵo. Mboga subite brue entiris per la nazo la aeron, prenis guton de la likvaĵo sur pinton de la fingro, kaj gustumis per la lango.

– Fi! – diris Fokin.

Sur ĉiuj vizaĝoj aperis sama esprimo.

– Mielo, – diris Mboga.

– Ĉu?! – miris Komov. Li hezitetis, sed ankaŭ etendis la fingron. (Tanja kaj Fokin observis liajn movojn kun abomeno). – Vera mielo! – eksklamaciis li. – Tilia mielo!

– Doktoro Dikson diris ke en tiu ĉi herbo estas multaj sukeridoj, – informis Mboga.

– Mielportanta monstro, – diris Fokin. – Vane ni ĝin tiel.

– «Ni»! – eksklamaciis Tanja. – Malfeliĉo vi mia! Iru kaj ordigu la intravidilon.

– Tiel do, – diris Komov. – Sed kion ni faru nun? Ĉi tie varmegas, kaj tiu ĉi bestkorpo apud la tendaro...

– Tion mi prenas sur min, – diris Mboga. – Deŝovu la tendojn je dudek paŝoj laŭ la strato. Mi faros ĉiujn mezurojn, ion pririgardos, kaj neniigos ĝin.

– Kiel? – demandis Tanja.

– Per desintegrilo. Mi havas desintegrilon. Kaj vi, Tanja, foriru de ĉi tie: mi okupiĝos nun pri tre neapetita laboro.

Ekaŭdiĝis piedfrapoj, kaj el post la tendoj elsaltis Rju kun granda aŭtomata pistolo en la mano.

– Kio okazis?! – pene spirante demandis li.

– Ni mortigis unun el viaj hipopotamoj, – grave klarigis Fokin.

Rju rapide alrigardis ĉiujn, kaj tuj trankviliĝis. Li enŝovis la pistolon en post la zonan.

– Ĉu atako? – demandis li.

– Fakte ne, – diris Komov konfuziĝe. – Ŝajnas ke ĝi simple promenadis, sed estis bezonate halti

ĝin.

Rju alrigardis la renversitan helikopteron, kaj klinis la kapon.

– Ĉu oni povas ĝin manĝi? – kriis Fokin el la tendo.

Mboga malrapide diris:

– Ŝajnas ke iu jam provis manĝi ĝin.

Komov kaj Rju venis al li. Mboga palpis per la fingroj larĝajn, profundajn kaj rektajn cikatrojn sur fileaj partoj de la besto.

– Tion faris titanaj kojnodontoj, – diris Mboga, – akraj kiel tranĉiloj. Iu kelkfoje deprenis de ĝi pecojn je du – tri kilogramoj.

– Terure! – diris Rju tre sincere.

Stranga longa krio pasis alte en la ĉielo. Ĉiuj levis la kapojn.

– Jen ili estas! – kriis Rju.

Sur la urbon impete falis grandaj helgrizaj birdoj, similaj al agloj. Ili falis unu post la alia de grandega alteco, kaj poste, super kapoj mem de la homoj, disvastigis la larĝajn molajn flugilojn, kaj same impete soris en la ĉielon, surblovante la homojn per ondoj da varma vento. Tio estis gigantaj birdoj, pli grandaj ol teraj kondoroj, kaj eĉ ol flugantaj drakoj de Pandoro.

– Karnovoruloj! – maltrankvile diris Rju.

Li jam tiris el post la zono sian pistolon, sed Mboga forte prenis lin je la mano.

La birdoj preterhastis super la urbo, kaj foriris okcidenten, en la violkoloran vesperan ĉielon. Kiam la lasta malaperis, ekaŭdiĝis sama alarma daŭra krio.

– Mi jam intencis pafi, – diris Rju faciliĝe.
– Mi scias, – kapklinis Mboga. – Sed al mi ekŝajnis... – Li haltis.

– Jes, – diris Komov, – ankaŭ al mi ekŝajnis...

Pripensinte, Komov ordonis ne nur deŝovi la tendojn je dudek paŝoj, sed ankaŭ levi ilin sur platan tegmenton de unu el la konstruaĵoj. La konstruaĵoj estis ne altaj, nur du-metraj, do surgrimpi ilin estis facile. Sur tegmenton de najbara konstruaĵo Tanja kaj Fokin levis pakojn kun plej valoraj aparatoj. Evidentiĝis ke la helikoptero ne paneis. Komov levis, kaj akurate sidigis ĝin sur tegmenton de tria konstruaĵo.

Mboga, ĉe lumĵetiloj, tutan nokton okupiĝis pri korpo de la monstro. Mateniĝe la straton aŭdigis penetra siblado, super la urbo leviĝis granda nuboda blanka vaporo, kaj ekflamis kurta oranĝkolora rebrilo. Fokin, kiu neniam antaŭe vidis kiel funkcias organika desintegriĝo, en nuraj kalsonetoj elflugis el la tendo, sed ekvidis nur grandegan amason da etgrajna griza polvo sur la nigriĝinta herbo, kaj na Mboga, kiu nehaste forprenadis la lumĵetilojn. De la mielportanta bestego restis nur perfekte preparita monstra kapo, muntita en travideblan plaston. Ĝi estis destinita al Kosmozoologia muzeo de Kejptaun.

Fokin diris al Mboga "bonan matenon", kaj regrimpadis jam en la tendon por daŭrigi la dormon, sed renkontis na Komov.

– Kien vi? – informiĝis Komov.

– Certe vestiĝi, – digne respondis Fokin.

La mateno estis freŝa kaj klara, nur sude en la violkolora ĉielo senmove staris blankaj taŭzitaĵoj

nuboj. Komov desaltis sur la herbon, kaj iris prepari la matenmanĝon. Li volis fari ovaĵon, sed rapide evidentiĝis ke forestas butero.

– Boris, – vokis li, – kie estas butero?

Fokin staris sur la tegmento en stranga pozo: li okupiĝis pri gimnastiko laŭ sistemo de joganoj.

– Tute ne scias, – respondis li fiere.

– Sed tio estas vi kiu deĵoris hieraŭ.

– E-e... jes. Do la butero estas tie kie estis hieraŭ vespere.

– Kaj kie ĝi estis hieraŭ vespere? – demandis Komov, detenante sin.

Fokin kun malkontenta mieno liberigis la kapon el sub la dekstra genuo.

– De kie mi scas? Ja ni poste ĉiujn kestojn relokgis.

Komov suspiris, kaj komencis pacience pririgardi keston post kesto. Butero forestis. Tiam li venis al la konstruaĵo, kaj deŝovis na Fokin je la piedo malsupren.

– Kie estas la butero? – demandis li.

Fokin jam malfermis la buŝon, sed tiam el post la angulo eliris Tanja en senmanumaĵo, kaj en kurta pantalono. Ŝiaj haroj estis malsekaj.

– Bonan matenon, knaboj, – diris ŝi.

– Bonan matenon, Tanjo, reeĥis Fokin. – Ĉu vi hazarde vidis keston kun la butero?

– Kie vi estis? – kruele demandis Komov.

– Mi baniĝis, – diris Tanja.

– Kiel tiel baniĝis? – diris Komov. – Kiu permesis?

Tanja debukis de la zono la elektran tranĉilegon

en plasta ingo, kaj ĵetis ĝin sur la kestojn.

– Genĉjo, – diris ŝi, – tie estas neniuj krokodiloj. Rimarkinda akvo kaj sabla grundo.

– Ĉu vi vidis la buteron? – demandis Komov.

– La buteron mi ne vidis, sed kiu vidis miajn ŝuojn?

– Mi vidis, – diris Fokin. – Ili sur tiu tegmento.

– Sur tiu tegmento ili forestas.

Ĉiuj tri turniĝis, kaj ekrigardis la tegmenton. La ŝuoj vere forestis. Tiam Komov alrigardis doktoron Mboga. Doktoro Mboga kuŝis en la herbo, en ombro, kaj profunde dormis, metinte sub la vangon la etan pugneton.

– Ja kio vi! Por kio al li miaj ŝuoj? – diris Tanja.

– Aŭ la butero, – aldonis Fokin.

– Eble ili malhelpis al li, – grumblis Komov.

– Bone do, mi penos prepari ion sen butero...

– Kaj sen ŝuoj.

– Bone, bone, – diris Komov. – Iru kaj okupiĝu pri la introvidilo. Kaj ankaŭ vi, Tanja. Kaj penu munti ĝin plej rapide.

Al la matenmanĝo venis Rju. Li pelis antaŭ si grandan nigran maŝinon sur seso da kvazaŭpiedoj. Post la maŝino restis vasta senherba pado. Ĝi tiriĝis de la centralo mem. Rju surgrimpis la tegmenton, eksidis ĉe la tablo. La maŝino ŝtoniĝis meze de la strato.

– Aŭskultu, Rju, – diris Komov, – ĉu ĉe vi en la centralo malaperis io?

– En kiu senco? – demandis Rju.

– Nu... vi lasas ion vespere en la korto, kaj matene ne povas trovi.

– Ŝajnas ke ne. – Rjulevetis la ŝultrojn. – Malaperas iam malgravaĵoj... ŝiraĵoj da kabloj, fortranĉaĵoj de litoplasto. Sed mi opinias ke tiun ĉi faktoron forprenas miaj kiberoj. Ili estas estaĵoj tre konservemaj, ili utiligas ĉion.

– Ĉu ili povas utiligi miajn ŝuojn? – demandis Tanja.

Rju ekridis.

– Mi ne scias, – diris li. – malverŝajnas.

– Kaj ĉu povas ili utiligi keston kun butero? – demandis Fokin.

Rju ĉesis ridi.

– Ĉu ĉe vi malaperis butero? – demandis li.

– Kaj ŝuoj.

– Ne, kiberoj ne vizitas la urbon.

Sur la tegmenton lerte, kiel lacerto, surgrimpis Mboga.

– Bonan matenon, – diris li. – Mi petas pardonon pro la malfruiĝo...

Tanja verŝis al li kafon. Mboga ĉiam matenmanĝis per unu taso da kafo.

– Do ni estas prirabitaj, – diris li, smajlante.

– Do tio estas ne vi? – demandis Fokin.

– Ne, ne mi. Sed nokte super la urbo dufoje preterflugis hieraŭaj birdoj.

– Do jen la ŝuoj, – diris Fokin. – Ie mi legis...

– Kaj kesto kun butero? – senpacience diris Komov.

Respondis neniu. Mboga pripense trinkis la kafon.

– Dum la du monatoj ĉe mi malaperis nenio. – diris Rju. – Fakte mi ĉion tenas en la kupolo... Krom

tio ĉe mi estas kiberroj. Kaj ĉiam fumo kaj krakado.

– Bone, – diris Fokin leviĝante, – iru ni labori, Tanjo. Ŝuoj, tio ne gravas!

Ili foriris, kaj Komov komencis kolekti la manĝilaron.

– Jam hodiaŭ vespere, – diris Rju, – mi metos ĉirkaŭ vi gardistojn.

– Tio eblas, – respondis Mboga, pripense. – Sed komence mi preferus mem. Genadij, mi kuŝos nun dormi, kaj nokte mi faros etan embuskon.

– Bone, doktoro Mboga, – diris Komov nevolonte.

– Tial ankaŭ mi venos, – proponis Rju.

– Venu, – konsentis Mboga. – Sed sen kiberroj, bonvolu.

De najbara tegmento venis eksplodo da indigno.

– Malfeliĉo vi mia, ja mi petis vin dismeti la pakojn en ordo de la muntado!

– Kaj kion mi faris? Guste tion!

– Ĉu tio estas ordo de la muntado? Indikilo «E-7», «A-2», «B-16»... Denove «E»!..

– Tanjo!.. Je mia vorto... Civitanoj! – ofende kriaĉis Fokin trans la straton. – Kiu konfuzis la pakojn?

– Jen! – kriis Tanja. Kaj pako “E-9” tute forestas!

Mboga mallaŭte diris:

– *Missus*, sed ĉe ni litotuko malaperis!

– Kio? – dirs Komov. Li estis pala. – Serĉu bone, – kriis li, desaltante de la tegmento kaj kurrante al Fokin kaj Tanja.

Mboga akompanis lin per la okuloj, kaj komen-

cis rigardi suden, trans la riveron. Aŭdeblis ke Komov sur la najbara tegmento diras:

- Kio fakte malaperis?
 - VĈG, respondis Tanja
 - Do kial vi kokiniĝis? Muntu alian.
 - Sed tio prenos du tagojn, - kolere diris Tanja.
- Kion do vi proponas?
- Tranĉi, - diris Fokin.

Sur la tegmento ekregis silento.

- Rigardu, Rju, - diris subite Mboga.

Li staris kaj, gardante sin de la suno, rigardis la riveron.

Rju turniĝis. Verda ebenaĵo trans la rivero makuliĝis per nigraĵoj. Tio estis dorsoj de "hipopotamoj", kaj ili estis tre multaj. Rju eĉ ne supozis ke trans la rivero estas tiom da "hipopotamoj". La nigraj makuloj malrapide moviĝis suden.

- Ŝajnas ke ili foriras, - diris Mboga.

Komov decidis noktumi sub libera ĉielo. Li prenis el la tendo siajn litaĵojn, kaj ekkuŝis sur la tegmento, metinte la manojn sub la kapon. La ĉielo estis nigra-blua, el post la horizonto, oriente, malrapide elrampis granda verd-oranĝa disko kun neklaraj randoj. Tio estis Palmiro, luno de Leonido. De trans la rivero, de malhela ebenaĵo, venadis dampitaj longdaŭraj krioj: verŝajne kriis birdoj. Super la centralo flamadis kurtaj rebriloj, kaj io grincis kaj kraketis nelaŭte.

«Necesas meti barilon», - pensis Komov. - «ĉirkaŭigi la urbon per drato, kaj apliki kurenton, ne tro fortan. Tamen, se temas pri birdoj, la barilo

ne helpas. Kaj plej verŝajne tio estas birdoj. Al tiu grandegulo ne estas problemo forporti pakon. Por ĝi, verŝajne, ne estas problemas forporti eĉ homon. Ja okazis jam, sur Pandoro, ke fluganta drako kaptis homon vestantan skafandron de plej alta gardo, sed tio estas cent kvindek kiogramoj. Tiel do statas: komence la botetoj, poste la pakajeto... Kaj por la tuta taĉmento nur unu karabeno! Kial Gorbovskij estis tiel kontraŭa al armiloj? Certe estis necese pafi tiam: minimume ni fortimigus ilin... Sed kial la doktoro ne pafis? Ĉar al li "ŝajnis"... Sed ankaŭ mi ne pafus, ĉar ankaŭ al mi "ŝajnis"... Sed kio, fakte, ŝajnis al mi?» – Komov forte frotis la frunton, sulkigitan pro la streĉo. – «Grandegaj birdoj, tre belaj birdoj, kaj kiel ili flugas! Kia senbrua, leĝera kaj perfekta flugo... Kio ja, iam eĉ ĉasistoj kom-patas la predon, kaj mi fakte estas eĉ ne ĉasisto.»

Tra la zenito, inter la trembrilaj steloj, nehaste iris blanka hela makuleto. Komov leviĝis sur la kub-utoj, observante ĝin. Tio estis "Sunfloro": descendista unu kaj duonkilometra superdistanca stelŝipo. Nun ĝi orbitas Leonidon je du megametroj de ĝia surfaco. Sufiĉas sendi alarmsignalon, kaj de tie venos helpo. Sed ĉu valoras sendi alarmsignalon? Malaperis paro da ŝuoj, du pakoj, kaj io ekŝajnis al la estro...

La blanka makuleto paliĝis kaj malaperis: «Sunfloro» foriris en ombron de Leonido. Komov denove kuŝiĝis, kaj metis la manojn sub la kapon. «Ĉu ne estas ĝi tro komforta?» – pensis li. – «Varmaj verdaj ebenaĵoj, aroma aero, idilia rivero sen krokodiloj... Eble tio estas nur ŝirmilo, post kiu agas

iuj nekonataj fortoj? Aŭ ĉio estas multe pli simpla? Tanja perdis la ŝuojn ie en la herbo; Fokin, kiel sci-ate, estas konfuzulo, kaj la malaperintaj pako-kuŝas nun ie sub amaso da partoj de la fos- maŝino».

Ŝajnas ke Komov ekdormetis, kaj kiam li vek- iĝis, Palmiro staris jam alte. El tendo kie dormis Fokin aŭdiĝis ŝmacoj kaj ronketoj. Sur la najbara tegmento oni iherflustris.

- ...Tuj kiam la kablo ŝiriĝis, ni forflugis, kaj Saburo restis malsupre. Li postkuris nin, kriis ke ni haltu, kaj poste enoficigis min estro, kaj ordonis ke mi haltu. Mi, certe, tuj komencis stiri al la relajsa masto. Tie ni ekpendis, kaj pendis la tutan nokton. Kaj la tutan nokton ni kriaĉis unu al la alia: ĉu iru Saburo al la instruisto aŭ ne. Saburo povis iri, sed ne volis, kaj ni volis, sed ne povis, kaj matene oni rimarkis nin de aerobuso, kaj deprenis.

- Kaj mi estis knabino kvieta, kaj ĉiam tre timis iujn ajn mekanikaĵojn. Jen kiberajn mi ĝis nun timas.

- Oni ne devas timi kiberajn, Tanjo. Ili estas bonkoraj.

- Ne ŝatas mi ilin. Malagrablas ke ili estas kaj vivaj kaj nevivaj...

Komov turniĝis sur la flankon, kaj ekrigardis. Tanja kaj Rju sidis sur la najbara tegmento, elpen- dante la krurojn. «Paseretoj» - pensis Komov. - «Kaj morgaŭ ili tutan tagon oscedos».

- Tanja, - diris li duonvoĉe, - iru dormi.

- Ial ne volas mi. - resonis Tanja. - Ni sur la bordo promenis. - (Rju konfuze ekmoviĝis.) - Tre

bone estas ĉe la rivero. Luno, kaj fiŝoj ludadas.

Rju diris:

– E-e... Kaj kie estas doktoro Mboga?

– Doktoro Mboga laboras, – diris Komov.

– Vere, Rju, – ĝojis Tanja. – Iru ni serĉi doktoron Mboga!

«Nekorektebla», – pensis Komov, kaj turniĝis sur la alian flankon.

Sur la tegmento oni daŭre flustradis. Komov decide leviĝis, prenis la litaĵojn, kaj revenis en la tendon. En la tendo estis tre brue: Fokin dormis plenforte. «Konfuzanto vi konfuzanto!» – pensis Komov, establiĝante. – «Ĝuste dum tiu ĉi nokto oni devas amindumi. Sed vi kreskigis la lipharojn, kaj opinias ke ĉio jam estas en ordo». Li envolviĝis en la litotukon, kaj momente ekdormis.

Surdiga tondro suprenĵetis lin en la lito. En la tendo estis mallume. Dudut! Du-dut! – ektondris ankoraŭ du pafoj.

– Ja kio estas tio? – kriaĉis Fokin en la mallumo. – Kiu estas ĉi tie?

Ekaŭdiĝis kurta lepora krieto, kaj triumfa kriaĉo de Fokin:

– Aha-a! Ĉi tien, al mi!

Komov komplikiĝis en la litotuko, kaj neniel povis leviĝi. Li ekaŭdis obtuzan frapon, Fokin diris «Oj!», kaj tuj io malhela kaj eta, preterkuris kaj malaperis en hela triangulo de la eliro. Komov ĵetiĝis tien. Kaj ankaŭ Fokin. Do ili svinge batiĝis per la kapoj. Komov dentogrincis, kaj fine elflugis eksteren. La kontraŭa tegmento esis malplena. Ĉirkaŭrigardinte Komov ekvidis ke laŭ la strato, ene

de la herbo, kuras al la rivero Mboga, kaj post li, proksime, kuras stumblante Rju kaj Tanja. Kaj ankoraŭ ion rimarkis Komov: antaŭ Mboga, malproksime, kuras iu, disŝovante la herbojn. Kuras ĝi multe pli rapide ol Mboga. Mboga haltis, per unu mano li levis la karabenon, per paftubo supren, kaj pafis ankoraŭfoje. La spuro en la herbo ĵetiĝis flanken, kaj malaperis post angulo de lasta konstruaĵo. Kaj post sekundo de tie, larĝe kaj facile svingante la grandegajn flugilojn, leviĝis birdo, blanka en la luna lumo.

– Pafu! – kriegis Fokin.

Li jam impetis sur la strato, kaj falis post ĉiuj kvin paŝoj. Mboga staris senmove, mallevante la karabenon, kaj, suprenklininte la kapon, observis la birdon. La birdo, altiĝante, faris glatan senbruan rondon super la urbo, kaj ekflugis suden. Post minuto ĝi malaperis. Kaj tiam Komov ekvidis ke super la centralo, tre malalte, preterflugis aliaj birdoj: tri, kvar, kvin... Kvin grandegaj blankaj birdoj ascendis de sur laborloko de la kiberoj, kaj malaperis.

Komov malleviĝis de la tegmento. Mortaj paralepipedoj de la konstruaĵoj ĵetis sur la herbon densajn nigrajn ombrojn. La herbo ŝajnis esti arĝenta. Io ektintis sub la piedo. Komov kliniĝis. En la herbo briletis kartoĉo. Komov trairis monstran ombron de la helikoptero. Ekaŭdiĝis voĉoj. Mboga, Fokin, Rju kaj Tanja nerapide iris renkonten.

– Mi tenis ĝin per la manoj! – ekscite parolis Fokin. – Sed ĝi frapis min je la frunton, kaj elŝiriĝis. Se ĝi ne frapus min, mi ĝin ne ellasus! Ĝi estis mola kaj varma, kiel bebo. Kaj nuda...

– Ankaŭ ni preskaŭ kaptis ĝin, – diris Tanja, – sed ĝi transformiĝis je birdo kaj forflugis.

– Nu-nu, – diris Fokin. – «Transformiĝis je birdo»...

– Vere, – konfirmis Rju. – Ĝi turnis sin post la angulon, kaj de tie tuj elflugis birdo.

– Kio do? – deklaris Fokin. – Ĝi fortimigis la birdon, sed vi malfermegis la buŝojn.

– Koincido, – diris Mboga.

Komov alvenis, kaj ili haltis.

– Kio fakte okazis? – demandis Komov.

– Mi jam tenis ĝin, – deklaris Fokin, – sed ĝi frapis min je la frunton.

– Tion mi jam aŭdis, – diris Komov. – De kio tio ĉi komenciĝis?

– Mi sidis inter la pakoj, embuske, – diris Mboga, – kaj ekvidis ke iu rampas en la herbo ĝuste meze de la strato. Mi volis kapti ĝin, kaj eliris renkonten, sed ĝi rimarkis min, kaj turniĝis reen. Mi komprenis ke mi ne scipovas kuratingi ĝin, kaj pafis en aeron. Mi tre bedaŭras, Genadij, sed ŝajnas ke mi timigis ilin.

Ekregis silento. Poste Fokin demandis nekomprene:

– Sed kion, fakte, vi bedaŭras, doktoro Mboga?

Mboga respondis ne tuj. Ĉiuj atendis.

– Ili estis minimume duopaj, – diris li. Unuan malkovris mi, dua estis en via tendo. Sed kiam mi kuris preter la helikoptero... Jen kio, – finis li neatendite: – oni devas iri kaj rigardi. Verŝajne mi eraris.

Mboga neaŭdeble ekpaŝis al la tendaro. Aliaj,

interrigardante, ekmoviĝis post li. Ĉe konstruaĵo, sur kiu staris la helikoptero, Mboga haltis.

– Ie ĉi tie, – diris li.

Fokin kaj Tanja senprokraste engrimpis la nigran ombron sub la muro. Rju kaj Komov atende rigardis de supre na Mboga. Mboga pensis.

– Nenio estas ĉi tie! – diris Fokin kolere.

– Sed kion mi vidis?... Kion mi vidis?.. murmuris Mboga. – Kion mi ekvidis?

Incitita Fokin elgrimpis el sob la muro. Nigra ombro de helikopteraĵoj glitetis sur lia vizaĝo.

– Ha! – diris Mboga laŭte. – Stranga ombro!

Mboga ellasis la karabenon, kaj kurante sursaltis la muron.

– Mi petas vin! – diris li de la tegmento.

Sur la tegmento, post korpo de la helikoptero, kvazaŭ sur montrofenestro de vendejo estis akurate dismetitaj aĵoj. Ĉi tie estis kesto kun butero, pako kun indikilo «E-9», paro da ŝuoj, poŝa mikroelektromezurilo en plasta ingo, kvar neŭtronaj akumuliloj, bulo da solidiĝinta vitroplasto, kaj nigraj okulvitroj.

– Jen la ŝuoj, – miris Tanja. – kaj la okulvitroj. Mi dronigis ilin hieraŭ en la rivero.

– Je-s... – diris Fokin, kaj singarde ĉirkaŭrigardis.

Komov kvazaŭ rekonsciiĝis.

– Rju, – diris li rapide. – mi devas tuj komunikiĝi kun «Sunfloro». Fokin, Tanja, fotu tiun ĉi eksponejon! Post duonhoro mi revenos.

Li desaltis de la tegmento, kaj rapide ekiris, poste ekkuris sur la strato alla centralo. Rju silente

sekvis lin.

– Kio ja estas tio?! – elkriaĉis Fokin.

Mboga kaŭriĝis, elprenis la etan pipon, nehaste fumigis ĝin, kaj diris:

– Tio estas homoj, Boris. Ŝteli aĵojn povas ankaŭ bestoj. Sed nur homoj scipovas redoni la ŝtelitan.

Fokin ekiris retren, kaj eksidis sur radon de la helikoptero.

Komov revenis sola. Li estis tre ekscitita, kaj per alta metala voĉo ordonis senprokraste malmunti la tendaron. Fokin jam ŝoviĝis al li kun la demandoj. Li postulis klarigojn. Tiam Komov per sama metala voĉo citis:

– «Ordono de ŝipestro de interstela ŝipo "Sunfloro". Dum tri horoj evakui la sinoptikan centralon kaj la arkeologian tendaron, malmobilizi ĉiujn kiber-sistemojn. Ĉiuj, inkluzive atmosfera fizikisto Vaseda, revenu na "Sunfloro"».

Pro la miro Fokin ekobeis, kaj eklaboris neku-time fervore. Dum du horoj la helikoptero faris ok flugirojn, kaj ŝargaj kiberroj eltretis en la herbo larĝan vojon de la centralo ĝis la ŝalupo. Sur loko de la centralo restis nur malplenaj konstruaĵoj; ĉiuj tri sistemoj da robotoj-konstruantoj estis enpelitaj en la deponejon, kaj plene malprogramitaj.

Je la sesa matene, laŭ loka tempo, kiam sur la oriento ekflamis verda matenlumo, la tre laciĝintaj homoj kolektiĝis ĉe la ŝalupo, kaj tiam, finfine, Fokin eksplodis.

– Nu bone, – komencis li per malbonsigna raŭka

flustro. – Vi, Genadij, disdonis al ni ordonojn, kaj mi honeste plenumis ilin. Sed, al kukolo, mi volas finfine scii: kial ni foriras de ĉi tie? Kial! – ekkriaĉis li subite falsete, pitoreske elĵetinte la manon. (Ĉiuj ekstremis, kaj Mboga ellasis el la dentoj la pipeton.) – Kial! Dum tri jarcentoj serĉi Fratojn je Racio, kaj malhonore fuĝi tuj post malkovri ilin? Plej eminentaj cerboj de la homaro...

– Malfeliĉo vi mia, – diris Tanja, kaj Fokin eksilentis.

– Nenion mi komprenas! – diris li per raŭka flustro.

– Ĉu vi opinias, Boris, ke ni kapablas prezenti plej eminentajn cerbojn de homaro? – demandis Mboga.

Komov malserene elmurmuris:

– Ĝis kiom ni aĉadis ĉi tie! Forbruligis tutan kampon, tretadis semitaĵojn, pafadis... Kaj en regiono de la centralo... – Li svingis la manon.

– Sed kiu povis scii, – diris Rju pardonpete.

– Jes, – diris Mboga, – ni faris multe da eraroj. Sed mi esperas ke ili komprenis nin. Ili estas sufiĉe civilizitaj por tio.

– Ĉu tio estas civilizacio! – eksklamaciis Fokin. – Kie estas maŝinoj? Kie estas laboriloj? Kaj urboj, kie estas urboj, demandas mi vin?

– Ja silentiĝu vi, Boris! – diris Komov. – «Maŝinoj... urboj»!.. Almenaŭ nun malfermu la okulojn! Ĉu ni scipovas flugi sur birdoj? Ĉu ĉe ni estas mieldonantaj monstroj, kiuj aldone prezentas viandon de la viva korpo? Ĉu delonge estis neniigita ĉe ni lasta kulo? Maŝinoj...

– Biologia civilizacio, – diris Mboga.

– Kio? – demandis Fokin.

– Biologia civilizacio. Ne maŝina, sed biologia. Selektado, genetiko, dresado. Kiu scias kiujn fortojn konkeris ili? Kaj kiu diros kiu civilizacio estas pli alta?

– Ĉu vi imagas, Boris, – diris Tanja, – dresitaj bakterioj!

Fokin furioze tordis la lipharon.

– Kaj foriras ni de ĉi tie tial, – diris Komov, – ke neniu el ni rajtas preni sur sin respondecon de unua kontakto.

«Ho kiel bedaŭrindas foriri!» – pensis li. – «Ege bedaŭrindas. Mi ne volas foriri. Mi volas trovi ilin. Renkontiĝi kun ili. Konversacii, rigardi kiaj ili estas. Ĉu vere tio finfine okazis? Ne dinosaŭroj iuj sencerbaj, ne hirudoj iuj, sed vera homaro. Tuta mondo, tuta historio... Ĉu estis ĉe vi militoj kaj revolucioj? Kio estis ĉe vi antaŭe: vaporo aŭ elektro? Kaj kio estas senco de vivo? Diru, kiom da lingvoj estas sur Leonido? Ĉu eblas preni ĉe vi ion por legi? Unua sperto de kompara historio de homaroj... Sed estas bezonate foriri. Aj-aj-aj, kiel mi ne volas foriri!.. Sed sur Tero jam kvindek jaroj ekzistas Komisiono pri Kontaktoj, kiu kvindek jaroj studas komparan psikologion de fiŝoj kaj formikoj, kaj disputas per kiu lingvo oni diru unuan "e...!" Sed nun oni jam ne priridos ilin. Nun ili, certe, laboros ŝvite. Interese, ĉu iu el ili antaŭvidis biologian civilizacion? Verŝajne jes. Ili antaŭvidis ion ajn. Feliĉuloj!».

– Tamen ĝis kiom antaŭvida homo estas Gorbovskij! – diris Mboga. – Li evidente sentis ion.

– Jes, – diris Tanja. – Timigas eĉ pensi pri tio kion faraĉus ĉi tie Boris, se ĉe ni estus armiloj!

– Kial nepre mi? – indigniĝis Fokin. – Kaj vi? Kiu iris baniĝi kun elektra tranĉilego?

– Ĉiuj ni estas bonaj, – diris Rju kun suspiro. Komov alrigardis la horloĝon.

– Starto post dudek minutoj. – deklaris li. Mi petas preni la lokojn.

Mboga prokrastetis en la kasono, kaj retrorigardis. Blanka suno, stelo EH 23, jam leviĝis super verdaj ebenaĵoj de Leonido. Odoris je malseka herbo, je varma tero, kaj je freŝa mielo. Super malproksimaj montetoj senmove pendis blankaj taŭzitaj nuboj.

– Jes, – diris Mboga, – Nekutime komforta planedo. Ĉu naturo kapablas krei tian?

1961